

Leterkesto, 2a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 430 1972.01.05 & 08

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Por esprimi agrablan novan jaron al niaj geaŭdantoj ni malfermas nian leterujon, en kiu nun troviĝas salutvortoj venintaj el 18 eŭropaj landoj : Belgio, Britio, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando, Francio, Germanioj Okcidenta kaj Orienta, Hungario, Italio, Jugoslavio, Nederlando, Norvegio, Pollando, Portugalio, Svedio kaj Svislando.

A.- Ni ricevis interesan leteron de gesinjoroj Robert kaj Helene Stoffers en Cassis, Francio, kiuj diras pri radio-prelegoj de doktoro Baur : *« Ni aŭdis vian elsendon, ke oni povus diri : Vi estas en nia domo. Ni ĝuste vivas en tre malgranda, sed internacia rondo. Mia edzino kaj mi (nordgermanoj), kaj la tria estas Victor Lebrun, iama sekretario de Grafo Leo Tolstoj. Victor Lebrun servis la grandan rusan poeton de 1899 ĝis lia morto en 1910. Kompreneble Lebrun estas ne junulo, li jam havas preskaŭ 90 jarojn. Grafo Leo Tolstoj faris grandan propagandon por Esperanto kaj tial Victor Lebrun iĝis Esperantisto en la jaro 1899. »*

Cl.- Se sinjoro Victor Lebrun ankoraŭ havas la forton, eble li akceptos skribi al ni kelkajn rememoraĵojn pri tiu malnova epoko de la esperanto-historio, kaj ni ilin legos al ĉiuj niaj geaŭdantoj. Ni atendas senpacience tiujn rememoraĵojn.

A.- En Orienta Eŭropo ofte niaj radio-prelegoj miksiĝas kun tiuj de Radio-Varsovio. Pri tio plendas du geaŭdantoj el Germanio Orienta : sinjoro Ernst Mutschall en Halle, kiu skribas : *« Eble Radio-Varsovio ŝanĝos iom la programon, ĉar merkrede kaj lunde ĝi elsendas preskaŭ je la sama tempo kiel vi. Ni jam plendis pri tio kaj mi esperas, ke ili ŝanĝos iom la tempon de elsendo. Tiom malmulte da verdaj stacioj kaj tamen unu devas ĝeni la alian. »*

Cl.- Kaj sinjoro Franz Tischer en Magdeburg foje ne plu sciis, ĉu parolas Svisa Radio aŭ Radio-Varsovio, ĉar samtempe aŭdiĝis unu el niaj prelegoj kaj rakonto pri terpoma rikoltado en Pollando.

A.- Persone ni tre esperas, ke foje tiu problemo solviĝos. Kiel ekzistas kunlaboro inter la franclingvaj elsendejoj, tiel devus ekzisti kunlaboro inter la esperantaj elsendiloj. Kaj tiu kunlaboro devus komenciĝi per adopto de ne konkurencaj horaroj.

Cl.- Ankoraŭfoje sinjoro Ludwig Pickel en numero de PILO-Press menciis tiun malagrablan ond-miksiĝon. Ankaŭ li esperis, ke foje solviĝos tiu ond-militeto per pli racia solvo, ol la nuna reganta situacio.

A.- Sinjoro R. Gonin en Villeurbanne, Francio, kiu aŭdas nin pere de la blindula sonbenda servo estas scivola pri la nuna situacio de nia redaktado de programita kurso por franclingvanoj. Li mem, kiu instruas esperanton, jam laboris al la verkado de strukturaj ekzercoj. Kaj li diras, ke tio postulas multan tempon. Jes, tiu tempo-postulado faras, ke nia laboro antaŭeniras tre malrapide. Ĝenerale unu leciono kaŭzas al ni inter 200 aŭ eĉ 300 labor-horoj. Nun estas verkata la 11-a leciono. Ĉiu leciono estas elprovita, antaŭ ol ni povas verki novan lecionon. Tamen ni esperas povi finverki tiun ĉi kurson dum tiu ĉi vintro.

Cl.- Ĉar multaj geaŭdantoj esprimis la deziron vidi lecionon de tiu kurso, ni aldonis al nia nov-jara cirkulero, kiun ni dissendis al ĉiuj geaŭdantoj, kiuj skribis al ni, la sepan lecionon,

kies erojn ni legis al vi la pasintan jaron en esperanto traduko. Ĉiuj, kiuj kapablas legi la francan lingvon povos retrovi tiun tekston sub programita vesto.

A.- Sinjoro R. Gonin tre atente aŭskultis niajn prilingvajn klarigojn, kaj li ne konsentas kun ĉio, kion ni diris. Ni legas el lia tre interesa letero :

Cl.- « *Koncerne vian pritraktadon de kelkaj aspektoj de la lingvo Esperanto, mi ne konsentas kun vi. Ekzemple : **Universala** – **globala** – **sociale** – **radikala**... en tiaj vortoj la finaĵo **–ala** ne povas havi vere komunan precizan difinon. Ĝia rolo en la lingvo tute ne estas komparebla kun tiu de **–aro**, **–ema** kaj tiel plu. Ĝi ne estas semantika elemento difinebla en vortaro kaj konsekvence ne devas esti nomata vera **sufikso**. Ĝi ekzistas en Esperanto nur pro tio, ke ĝi jam ekzistis en aliaj lingvoj, inter alie en la latina. Ĝi estas nur morfologia elemento kaj sekve nur **pseŭdosufikso**. Ĝia ekzistado en la internacia lingvo rilatas al la sama problemo, kiel tiu de vortoj kiel **poeto**, **poemo**, **poezio** kaj ceteraj, kiuj bezonas apartajn difinojn en la vortaro. Ilin pravigas nur la internacieco de la formo. »*

A.- Jes, ni tute konsentas kun tiuj diroj. Ni tamen rimarkis, kiam ni analizis la oftecon de la sufiksoj aŭ pseŭdosufiksoj, ke la pseŭdosufikso **–al** estas tre ofta kun ĉiam sama rolo. Pro tio ni opinias, ke en esperanto-kurso estas necese diri kelkajn vortojn pri similaj pseŭdosufiksoj, eĉ se ĝis hodiaŭ tio ne estis farita. Ni vidos kiel ni redaktos tiun ĉapitron, kaj pere de la radio ni eble diskonigos ĝin, por vidi kiajn reagojn ĝi vekas.

Cl.- Sinjoro Gonin tute konsentas kun ni koncerne la neceson eviti la propagandon, la blufadon per troa emfazo de la « *mirakla facileco* » de esperanto, kaj male informi la publikon pri veraj, trafaj, praktikaj faktoj.

A.- Ankaŭ sinjoro Günter Becker en Blieskastel, Germanio Okcidenta, skribis koncerne nian programitan laboron, same kiel sinjorino Jadwigz Paszkiewicz en Sosnowiec, Pollando kaj sinjoro Jiri Patera en Most, Ĉeĥoslovakio. Tiu aŭskultanto detalege parolas al ni pri la esperanto-vivo en Ĉeĥoslovakio. Interalie li raportas pri sukcesaj intergrupaj renkontiĝoj, kiuj vekis entuziasmon, ĉar ili rompis kun la tradicia izoliteco.

Cl.- Multaj norvegoj skribis por ricevi nian radio-programon. Konklude al tiu prelego ni salutas ilin :

A.- Ili estas : sinjoroj Aslang Retsinq, Støp-Bowitz, Bert Bowitz, Signe Korsbvedt, Junger Richard, Bügge-Paŭse, Kjill Gustavsen, John Berggreen, sinjorino Brynhild Øslmo en Oslo, sinjoroj Marif Delo en Ljan, Guichiro Cekujema en Lysaker kaj Astrid Nansrud en Bekkelagshøgor. Eble ili ridas pro nia deĉifrado, sed ni vere penis por legi iliajn salutojn. Ni petas la skribantojn ĉiam tre legeble skribi siajn nomojn, kaj seeble meti interkrampe la fonetikan prononcadon per esperantaj literoj.

Cl.- Vi aŭdis babiladon el Svislando. La venontan semajnon ni refoje malfermos nian leterujon. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !